suspens/i *chem* be in suspension
suspir/i sigh
susur/i rustle; swish
sutan/o soutane, cassock
sutr/o *rel* Sutra
sutur/o, -i suture; seam
suveren/o, -a sovereign
svag/a *lit* vague
svahil/a Swahili
svarm/i, -o swarm
svastik/o swastika
svat/i act as matchmaker; propose in marriage
sved/o Swede; **-a** Swedish
svelt/a slender, slim
sven/i faint, swoon; disappear
sving/i wave, brandish; fling
svis/o, -a Swiss

Ŝ

ŝablon/o pattern, template, jig; stencil; conventionalism
ŝaf/o sheep; **-aĵo** mutton
ŝaft/o *mech* shaft
ŝagrin/o shagreen (leather)
ŝah/o shah
ŝajn/i seem appear; **-igi** feign; pretend
ŝak/o chess; check; **-i** be in check; **-(on)!** check!
ŝakal/o jackal
ŝakr/i trade in a small or illicit way, peddle
ŝakt/o (mine-, lift-)shaft
ŝal/o shawl
ŝalm/o (reed-)pipe; straw (for drinking)
ŝalt/i switch on; **-ilo** switch; **el-i, mal-i** switch off
ŝalup/o launch (boat)
ŝam/o chamois leather, wash-leather
ŝaman/o shaman
ŝampinjon/o (common edible) mushroom
ŝampu/o, -i shampoo
ŝanc/o chance (of success)
ŝancel/i shake *tr*, unsettle, make unstable; **-iĝi** totter; waver
ŝanel/o channel, fairway
ŝanĝ/i change *tr;* **-iĝi** change *intr;* **inter-o** exchange
ŝankr/o *med* chancre
ŝarad/o charade(s)
ŝarg/i load (camera, gun); charge (accumulator)
ŝarĝ/i, -o load, burden; charge (task entrusted); **-aŭto** lorry, truck
ŝarif/o (Mohammedan) sherif
ŝark/o shark
ŝat/i prize, think well of, have a high regard for; like
ŝaŭm/o, -i foam, froth
ŝejk/o sheikh
Ŝekspir/o Shakespeare
ŝel/o any natural integument: peel (of orange); bark (of tree); shell (of egg)
ŝelak/o shellac
ŝelk/o *Br* braces, *US* suspenders; **-eto** shoulder-straps
ŝenopraz/o chive(s) (herb)
Ŝeol/o *bib* She'ol
ŝer/o offshore reef, islet
ŝerc/i, -o joke, jest
ŝere/o sherry
ŝerif/o sheriff
ŝi *pronoun* she; **-a** her(s)
ŝibolet/o shibboleth
ŝijaism/o *rel* Shiahism (Islamic sect)
ŝijaist/o *rel* Shiahist
ŝik/a chic
ŝil/o chyle
ŝild/o shield; sign-board
ŝiling/o shilling
ŝim/i mildew, go mouldy
Ŝimŝon *bib* Samson
ŝind/o shingle, wooden tile
ŝink/o ham
ŝinto/o *rel* Shinto(ism)
ŝip/o ship; **-anaro** crew; **-pereo** shipwreck
ŝir/i tear, rip *tr;* **de-i** pick
ŝirm/i shelter, screen
ŝkot/o *naut* sheet
ŝlagr/o hit-song
[**ŝlak/o** slag]
ŝlem/o slam (at cards)
ŝlif/i grind, polish smooth
ŝlim/o slime, sludge, silt
ŝlos/i lock; **-ilo** key
ŝmac/i smack (the lips); kiss noisily; make a sucking noise
ŝmink/o make-up; **-i** make up, paint (the face)
ŝmir/i anoint, smear; spread (butter *etc*); grease; bribe
ŝnur/o rope; cord; line; *geom* chord; **-salti** skip

ŝofor/o driver, chauffeur
ŝogun/o shogun (Japanese ruler)
ŝok/i, -o shock
ŝorbet/o sorbet, sherbet
ŝos/o shoot, sprout
ŝose/o roadway; (high) road
ŝov/i push along, slide *tr;* **el-i la langon** stick out one's tongue; **trans-o** *psych* transference
ŝovel/i shovel; scoop
ŝovinism/o chauvinism, jingoism
ŝovinist/o chauvinist
ŝpal/o *railw* sleeper, tie
ŝpar/i save (money *etc*); economize
ŝpat/o spade
ŝpic/o pomeranian (dog)
ŝpin/i spin (into thread)
ŝpruc/i gush out, shoot forth *intr;* **-igi** squirt *tr*, inject, spray
ŝpur/o gauge (of track)
ŝrank/o cupboard
ŝrapnel/o shrapnel (shell)
ŝraŭb/o, -i screw; **-ingo** nut; **-ŝlosilo** wrench, spanner; **-(turn)-ilo** screwdriver; **-tenilo** vice
ŝrump/i shrivel up; shrink *intr*
ŝtal/o steel
ŝtat/o *pol* state; **-igi** nationalize
ŝtel/i steal, thieve; **-ĉasi** poach
ŝtern/o tern (bird)
ŝtip/o log; chopping-block; **-arumi** burn at the stake
ŝtof/o cloth, material; **sub-i** line
ŝton/o stone
ŝtop/i stop up, plug; clog; **-ilo** plug; **-ilingo** (wall-)plug, point, socket
ŝtorm/o storm
ŝtrump/o stocking; **-eto** sock
ŝtup/o step; **-aro** staircase; **-areto** step-ladder; **-etaro** ladder
ŝu/o shoe
ŝuld/i owe; **-o** debt
ŝultr/o shoulder
ŝunt/o, -i *elec* shunt
ŝut/i pour out, tip out *tr;* **super-i** overwhelm
ŝutr/o (window) shutter
ŝvab/o, -a Swabian
ŝvabr/i mop, swab
ŝveb/i hover; float (in the air)
ŝvel/i swell, become swollen
ŝvit/i sweat, perspire

T

tabak/o tobacco
taban/o gad-fly, cleg
tabel/o table, tabulation; (writing-)tablet
tabernakl/o tabernacle
tabl/o table (furniture)
tablojd/o tablet (aspirin *etc*)
tabu/o tabu
tabul/o board; plank
taburet/o stool
taĉment/o detachment; team; shift
Tade/o Thaddeus
tadorn/o shelduck, sheldrake
taft/o taffeta
tag/o day; **-iĝo** daybreak; **-libro** diary; **-manĝo** lunch, dinner; **-mezo** midday; **-ordo** agenda; **ĉiu-a** daily
taget/o French marigold
Tahiti/o Tahiti
taj/o, -a Thai
tajd/o tide
tajfun/o typhoon
tajl/i cut (diamond), cut out (garment)
tajlor/o, -i tailor
tajp/i type (with typewriter)
tak/i *naut* go about; tack; wear
takel/o (block and) tackle
takimetr/o tachometer, speedometer
taks/i estimate, value (at); rate
taksi/o taxi, cab

taksimetr/o taximeter
taksus/o yew
takt/o tact; *mus* time; **kvar-a motoro** four-stroke engine
taktik/o tactics
tal/o *bot* thallus
talant/o talent (money, weight)
talar/o gown, robe (*e.g.* lawyer's)
talent/o talent
taler/o *obs* thaler (coin)
tali/o waist; waistline
talisman/o talisman
talium/o *chem* thallium
talk/o talc(um)
Talmud/o Talmud, Jewish law
talon/o stock (cards not yet dealt); counterfoil
talp/o mole (animal); overzealous propagandist, undermining through shortsightedness
talus/o slope, ramp; embankment
tamari(s)k/o *bot* tamarisk
tamarind/o *bot* tamarind
tambur/o drum
tamburin/o tambourine
tamen however, nevertheless
Tamiz/o Thames
tamtam/o tom-tom
tan/i tan (leather)
tanacet/o *bot* tansy
tanagr/o tanager (bird)
tandem/o tandem
1 **tang/i** pitch (ship, plane)
2 **tang/o** tango (dance)
Tanganjik/o Tanganyika
Tanzani/o Tanzania
tangent/o tangent (of an angle)
tanĝ/i be tangential to; brush with; **-anto** tangent (to a circle)
Tanĝer/o Tangiers
tanin/o tannin
tank/o *mil* tank
tanka/o tanka (poem)
tantal/o *chem* tantalum; **T-o** Tantalus; **-igi, -izi** tantalize
tantiem/o share (of profits); royalties
taoism/o Taoism
tapet/o wallpaper, wall-covering; tapestry
tapiok/o tapioca
tapir/o tapir
tapiŝ/o carpet
tar/o tare (weight)
tarantel/o tarantella (dance)
tarantul/o tarantula (spider)
tard/a *lit* late
tarif/o tariff
tarok/o tarot (playing-card)
tars/o tarsus; instep
tarsi/o tarsier
tartan/o tartan
tartr/o tartar; scale, fur; **-ato** tartrate
tas/o cup; **sub-o** saucer
task/o task, job; (school)work
Tasmani/o Tasmania
tatam/o (Japanese) matting
tatu/i tattoo
taŭg/i be fit (for), be of use, serve, do; **-a** suitable, fitting, adequate; **sen-ulo** good-for-nothing
taŭr/o bull
Taŭrid/o Tauris
taŭtologi/o tautology
taŭz/i tousle, dishevel; jostle
tavern/o tavern, inn
tavol/o layer; stratum
te/o tea; **-kruĉo** tea-pot; **-manĝo** tea (meal)
team/o team
teatr/o theatre; **-aĵo** play
Teb/o Thebes
ted/i bore, tire; **-a** tedious
teg/i cover, protect; face, coat
tegment/o roof
tegol/o (roofing) tile
tegument/o tegument
teh . . . → TEK . . .
teism/o theism
teist/o theist
tek/o briefcase; *bio* theca; collection, file
tekneci/o *chem* technetium
teknik/o technique; technics, technology; **-a** technical

teknologi/o technology
teks/i weave; **-aĵo** textile; **-ilo** loom
tekst/o text; words (of song); **-i** read, say *intr*
tekton/o teak
tele/ *tech prefix* tele-: **-objektivo** telephoto lens; **-presilo** teleprinter; **-vido** television
teleaŭtograf/o teleautograph
telefon/o, -i telephone
telefoni/o telephony
telegraf/o, -i telegraph
telegrafi/o telegraphy
telegram/o telegram
telemetr/o, -i range-find(er), telemeter
telemetri/o telemetry
teleologi/o teleology
telepati/o telepathy
teler/o plate
teleskop/o telescope
telfer/o cable-way, telpher line
telur/o *chem* tellurium
tem/o subject, theme, topic; **-i pri** be on the subject of; be a question of
tembr/o *mus, phon* timbre, tamber
temp/o time; tense; **inter-e** meanwhile; **sam-a** simultaneous; contemporary; **sia-e** at the time, formerly; in due course
temper/o tempera, distemper (painting); **-i** *mus* temper
temperament/o temperament, spirit
temperatur/o temperature
tempest/o storm, tempest
tempi/o *anat* temple
templ/o temple; place of worship
temporal/o temporal bone
ten/i hold; keep, maintain; have; **sin -i** stand firm; behave; have a (particular) attitude (to); **-ilo** handle; **al-iĝi** adhere; **de-i** restrain; **el-i** endure, bear; **en-i** contain; **re-i** hold back *tr;* retain; **sin-o** attitude; **sinde-o** abstention (voting); **sub-i** support; second (motion)
tenac/a tenacious; clinging
tenajl/o pliers; **-i** pincer
tend/o tent; **-aro, -umi** camp
tenden/o tendon, sinew
tendenc/o tendency (trend; bias)
tendr/o *railw* tender
tenebr/o *lit* darkness
tener/a *lit* tender(-hearted)
teni/o tapeworm
tenis/o tennis
tenon/o tenon
tenor/o *mus* tenor
tens/o *gram* tense
tensi/o *phys, elec, med* tension
tensor/o tensor
tent/i tempt
tentakl/o tentacle
teodolit/o theodolite
Teodor/o Theodore
teokrat/o theocrat
teokrati/o theocracy
teolog/o theologian
teologi/o theology
teorem/o theorem
teori/o theory; **-a** theoretical
teozofi/o theosophy
tepid/a *lit* tepid, lukewarm
ter/o earth; ground; **-kultivo, -kulturo** agriculture; **-piro** Jerusalem artichoke; **-pomo** potato; **-skuo** earth tremor; **-tremo** earthquake; **en-igi** bury; **sub-a** underground
terakot/o terra cotta
terapeŭtik/o therapeutics
terapi/o therapy
teraplan/o hovercraft
teras/o terrace
teratologi/o teratology
terbi/o *chem* terbium
tercet/o *mus* trio; tercet, triplet
terci/o *mus* third; t(i)erce
terciar/a tertiary
terebint/o turpentine
tered/o teredo, ship-worm

teren/o terrain; grounds; field (of activity)
Terez/a Theresa
teritori/o territory
term/o *math etc* term
termik/a thermic, thermal
termin/o (technical *etc*) term; **-aro** glossary
termit/o termite
termo/ *tech morpheme* thermo-: **-dinamiko** thermodynamics; **-regulilo** thermostat
termometr/o thermometer
termos/o vacuum flask, thermos
termostat/o thermostat
tern/i, -o sneeze
teror/o reign of terror; **-i** terrorize
terur/o terror; **-a** terrible; **-i** terrify
test/o, -i *chem, med, psych etc* test
testament/o will; testament; **-i** bequeath
testik/o testicle
testosteron/o testosterone
testud/o tortoise
tetan/o tetanus
tetr/o black grouse
1 **tetra/** *sci prefix* tetra-: **-klorido** tetrachloride
2 **tetra/o** hazel hen
tetrak/o little bustard
tetralogi/o tetralogy
tetrark/o tetrarch
teŭkri/o *bot* wood-sage
teŭton/o, -a Teuton(ic)
tez/o thesis
Teze/o Theseus
tia *demonstrative adj* such, that kind of
tial therefore, for that reason
tiam then, at that time
tiamin/o thiamine
tiar/o tiara
Tibet/o Tibet
tibi/o tibia, shin-bone
tie there, in that place; **-n** there, to that place; **-n kaj reen** back and forth; **-a** local; **- ĉi, ĉi -** here
tiel so, in that way; **tiel . . . kiel** as . . . as
ties that one's
tif/o typhus; **-oido** typhoid
tifa/o *bot* reedmace
tifon/o typhoon
tig/o stem, stalk
tigr/o tiger
1 **tik/o** tic
2 **tik/o** ticking (cloth)
tikl/i tickle *tr*
tiktak/i tick (clock *etc*)
tild/o tilde (˜)
tili/o lime-tree, linden
tim/i, -o fear
timal/o grayling (fish)
timbal/o kettledrum; pie-crust
timian/o thyme
timid/a *lit* timid, shy
timol/o *chem* thymol
timon/o shaft (of cart *etc*)
timpan/o ear-drum; *archit* tympanum, spandrel
timpanon/o *mus* dulcimer
timus/o thymus (gland)
tin/o tub, vat; [tuna]
tindr/o tinder, touchwood
tine/o clothes-moth; tinea
tink/o tench (fish)
tinktur/o dye; tincture; **-i** dye
tint/i tinkle, jingle, clink *intr*
tinunkol/o kestrel
tinus/o tunny(-fish), tuna
tio *demonstrative pronoun* that
tio/ *chem prefix* thio-
tiom (da) so much; so many; **tiom . . . kiom . . .** as much/many . . . as . . .
tip/o type; **-a** typical
tipograf/o typographer
tipografi/o typography
tipol/o, tipul/o daddy-long-legs, crane-fly
tir/i pull, draw; **-kesto** drawer; **al-i** attract; **el-aĵo** excerpt
tiraljor/o sharp-shooter
tiran/o tyrant; **-i** tyrannize
tiravir/o *naut* parbuckle

tiroid/o thyroid (gland)
Tirol/o Tyrol
titan/o Titan
titani/o *chem* titanium
titol/o title, heading; **-i** give a title to
titr/o titre, strength, fineness; **-i** titrate
tiu *demonstrative pronoun and adj* that one; that; **-cele** with that end in view; **- ĉi, ĉi -** this one; this
tizan/o tisane, infusion
toast/o toast (bread)
tobogan/o, -i toboggan
tof/o *geol* tuff
tofe/o toffee
1 **tog/o** toga
2 **Tog/o** Togo
tokat/o *mus* toccata
toks/o toxic substance; **-ologio** toxicology
toksin/o toxin
tol/o linen cloth, sheeting; **-ajo** (made-up) linen or calico; lingerie
toler/i tolerate
toluen/o *chem* toluene
tomahok/o tomahawk
tomat/o tomato
tomb/o grave, tomb; **-ejo** cemetery, churchyard
tombak/o tombac, red brass; imitation, sham
tombol/o tombola, charity raffle
tomism/o Thomism
ton/o tone
tonal/o *mus* key
tond/i shear, clip, cut (as with scissors); **-ilo** scissors; **pri-i** prune
tondr/i, -o thunder
tonel/o *naut* ton; **-aro** tonnage
tonik/o *mus* tonic, keynote
tonsil/o tonsil
tonsur/o, -i tonsure
tontin/o tontine
tonus/o *med* tone, tonus
top/o *naut* top; **-velo** topsail
topaz/o topaz
topograf/o topographer
topografi/o topography
topologi/o *math* topology
topor/o axe, hatchet
tor/o torus
torak/o *anat* thorax
torĉ/o torch
tord/i twist *tr*
toreador/o toreador
torent/o torrent
torf/o peat
tori/o *chem* thorium
torij/o torii (gateway)
torn/i turn (on a lathe) *tr;* **-ilo** lathe
tornistr/o knapsack; satchel
torped/o, -i torpedo
torpor/o torpor
tors/o torso, trunk
tort/o tart, pie, gateau
tortur/o, -i torture
tost/o, -i toast (drink someone's health)
total/a total; **-ismo** totalitarian
totan/o redshank (bird)
totem/o totem
tra *prepn* through; *prefix* **-veturi** pass through
trab/o beam, girder
[**trabant/o** satellite]
trac/o, -a Thracian
trad/o trade-wind
tradici/o tradition
traduk/i translate
traf/i hit (the mark); catch (a train); run up against; **-a** striking
trafik/o traffic
tragant/o tragacanth
tragedi/o tragedy
tragik/a tragic
tragikomedi/o tragi-comedy
traĥe/o trachea, windpipe
trajektori/o trajectory; flight-path
trajn/o *railw, mil* train
trajt/o trait, feature

trak/o track (*railw;* tape); *aero* course; **-forko** points, switch
trake/o trachea, windpipe
trakom/o *med* trachoma
trakt/i treat, deal with; **-aĵo** treatise
traktat/o treaty
traktor/o tractor
tram/o tram
tramp/o tramp (vagrant; *naut*)
trampolin/o trampoline
tranc/o trance
tranĉ/i cut (with knife *etc*); **-aĵo** slice; **-ilo** knife
tranĉe/o *mil* trench
trankvil/a calm, tranquil; **mal-igi** worry, disturb
trans *prepn* across (*with nom* on the other side of; *with accus* to the other side of); **-igi** transfer; *prefix* **-doni** hand over; **-formi** transform
transakci/o *com* transaction
transcend/a transcendent(al)
transept/o transept
transfuz/i transfuse (blood)
transistor/o transistor
transit/o transit (customs)
transitiv/a transitive
translaci/o *mech* translation (change of place); *law* transferring, conveyance
transmisi/o *mech* transmission
transmutaci/o *chem* transmutation
transpon/i *mus* transpose
transvers/a transverse, cross
trapez/o trapezium; trapeze
trat/o (banker's) draft, bill; **-i** draw (a bill on)
traŭb/o grapes
traŭm/o trauma
travesti/i, -o travesty
tre very; very much; **- povas esti** it may very well be; **-ege** extremely
tred/i thread (needle *etc*)
tref/o clubs (cards)
trejn/i train, coach
trem/i tremble, quiver; shiver; rattle
trema/o diaeresis (¨)
trematod/o *zool* trematode, fluke
tremol/o aspen
tremp/i dip, dunk; soak *tr*
tren/i tow; trail, drag along *tr;* **-ŝipo** tug
trepan/o, -i trepan
tret/i trample (on); tread (on)
trezor/o treasure
tri three; **-o** trio; **T-unuo** Trinity; *prefix* tri-
trias/o *geol* Triassic (period)
trib/o tribe
tribord/o *naut* starboard
tribrak/o tribrach (verse)
tribun/o rostrum, platform
tribunal/o tribunal; court (of justice)
tribunus/o (Roman) tribune
tribut/o, -i (pay) tribute
trici/o *chem* tritium
tricikl/o tricycle
tridakn/o giant clam
trifl/o (culinary) trifle
trifoli/o clover, trefoil
trifori/o *archit* triforium
triglif/o *archit* triglyph
trigonometri/o trigonometry
triĥin/o, trikin/o trichina, thread-worm
trik/i knit *tr;* **-ilo** knitting-needle
trikoloret/o pansy
trikot/o stockinet; **-aĵo** singlet; tights
trikromi/o *phot* three-colour process
triktrak/o backgammon
tril/o, -i *mus* shake, trill
trilion/o trillion
trilobit/o trilobite
trilogi/o trilogy
trimestr/o term; quarter
tring/o sandpiper
Trinidad/o Trinidad
trink/i drink
trinom/o *math* trinomial

triod/o triode
triolet/o triolet; *mus* triplet
trip/o tripe; gut
tripang/o sea-slug, trepang
tripanosom/o trypanosome
trips/o thrips (insect)
triptik/o triptych; triptyque
trirem/o trireme
trist/a *lit* sad
trit/o newt
tritik/o wheat
Triton/o Triton
triumf/o, -i triumph
triumvir/o triumvir
triv/i wear out *tr*
trivial/a vulgar, coarse
tro too; too much; **-igi** exaggerate
trobador/o troubador
trofe/o trophy
trog/o trough; manger
troglodit/o caveman; wren
troke/o trochee (verse)
1 **trol/o** trawl
2 **trol/o** troll
trole/o (overhead) trolley
1 **tromb/o** waterspout
2 **tromb/o** *med* thrombus; **-ozo** thrombosis
trombon/o trombone
tromp/i deceive; cheat
tron/o throne; **-i** reign
trop/o trope, figure of speech
tropeol/o nasturtium
tropik/o tropic
tropism/o *bio* tropism
troposfer/o troposphere
trot/i trot
trotuar/o pavement, sidewalk
trov/i find; **-iĝi** be, be found
tru/o hole; **-i** punch; puncture; **-etaro** perforation
[**trubadur/o** troubadour]
trud/i impose, thrust (upon); **en-iĝi** intrude
truf/o truffle
truk/o trick; **-ado** faking; trick photography *etc*
trul/o trowel
trum/o *archit* pier (wall mass between openings); pier-glass
trumpet/o, -i trumpet
trunk/o trunk (of tree, body *etc*); *geom* frustrum; **-i** truncate
trup/o troupe; troop
trus/o truss (girder *etc*)
trust/o trust (restrictive practice)
trut/o trout
tualet/o toilette
tub/o tube, pipe; (gun) barrel
tuber/o bump, lump; gnarl, knot; knob; tuber
tuberkul/o tubercle; **-ozo** tuberculosis
tuberos/o *bot* tuberose
tubj/o *mus* tuba
tuĉ/o indian ink
tuf/o tuft; wisp; hank
tuj immediately; **- kiam** as soon as; **tuj/a** instant, immediate
tuj/o *bot* arbor vitae, thuja
tuk/o a cloth; **antaŭ-o** apron
tukan/o toucan (bird)
tul/o tulle
tuli/o *chem* thulium
tulip/o tulip
tumor/o tumour
tumul/o tumulus
tumult/o riot; tumult
tun/o ton (weight)
tundr/o tundra
tunel/o tunnel
tungsten/o tungsten
tunik/o tunic
Tunizi/o Tunisia
tur/o tower; rook (at chess)
turb/o (spinning-)top
turban/o turban
turbin/o turbine; **-reaktoro** turbo-jet
turd/o thrush (bird)
turism/o touring, travel, tourism
turist/o tourist
turk/o Turk; **-a** Turkish
turkis/o turquoise
turmalin/o tourmaline
turment/i, -o torment; torture

turn/i turn *tr*
turne/o *theat* tour
turnir/o tournament
turp/a *lit* ugly
turt/o turtle-dove
tus/i, -o cough
tusilag/o *bot* coltsfoot
tuŝ/i touch *tr*
tut/a entire, whole; **-e** wholly, quite; **-e ne** not at all; **-o** whole; **-monda** world-wide; **super-o** overalls
tvist/o, -i twist (dance)

U

ued/o wadi
uj/o container, receptacle; *as suffix see p.* 33
ukaz/o ukase
Ukrajn/o the Ukraine
ukulel/o ukulele
ul/o fellow; *as suffix see p.* 33
ulan/o uhlan
ulcer/o ulcer
uleks/o, ulik/o gorse, furze, whin
ulem/o ulema
ulm/o elm
ulmari/o *bot* meadow-sweet
uln/o *anat* ulna; ell, cubit
ultimat/o ultimatum
ultra/ *sci prefix* ultra-: **-violo** ultra-violet
ultramar/o, -a ultramarine (blue)
ulul/i hoot (owl); howl
um/o *word of no defined meaning*, thingummyjig; *as suffix see p.* 33
umbel/o *bot* umbel
umbel(ifer)ac/o *bot* umbellifer
umbilik/o navel
ume/o Japanese plum (Prunus mume)
unc/o ounce (weight)
ung/o nail; claw
ungvent/o ointment, unguent
uni/o *pol* union
uniform/o uniform
unik/a unique; one and only
unison/o unison
unitarian/o Unitarian
univers/o universe
universal/a universal
universitat/o university
unu one; **eĉ ne unu** not a single (one); **-j . . . aliaj** . . . some . . . others . . . ; **unu/a** first; **-o** unit; **-eco** unity; **-eca, -iĝinta** united; **-iĝo** union; **-obla** single; **-opa** individual, separate
upas/o upas (tree)
upup/o hoopoe
ur/o aurochs
uragan/o hurricane
urani/o uranium
urb/o town, city; **-a** urban; municipal; **-estro** mayor; **-(o)-domo** town hall; **antaŭ-o** suburb
ure/o *chem* urea
uremi/o *med* uraemia
uretan/o *chem* urethane
ureter/o *anat* ureter
uretr/o *anat* urethra
urĝ/i be urgent, be pressing; urge (that a thing be done); **-a** urgent
uri/o guillemot (bird)
urin/i urinate; **-o** urine
urn/o urn
urogal/o capercaillie (bird)
urotropin/o urotropin, hexamine
urs/o bear (animal)
urtik/o nettle
urtikari/o nettle-rash
Urugvaj/o Uruguay
uruŝi/o japanese lacquer
Uson/o the United States, USA
uta/o uta (Japanese poem)
uter/o womb
util/a useful; **-igi** utilize; **mal-a** harmful
utopi/o utopia

uvertur/o *mus* overture
uvul/o uvula
uz/i use; **el-i** wear out *tr*, use up
uzin/o (steel- *etc*)works
uzukap/i usucapt (Roman law)
uzur/o usury
uzurp/i usurp
[**uzurpator/o** usurper]

Ŭ

ŭa! wah! (baby's cry)
ŭat/o *elec* watt

V

vaĉ/o *naut* watch; **-i** be on watch
vad/i wade; **tra-i** ford
vafl/o waffle; **-eto** wafer
vag/i wander, roam
vagabond/o vagabond, vagrant
vagin/o *anat* vagina
vagon/o *railw* coach, carriage; **-aro** train
vak/i be vacant
vakcin/o vaccine; **-i** vaccinate
vakcini/o cowberry
vaker/o cowboy
vaks/o, -i wax; **-tolo** oilcloth
vaku/o vacuum
val/o valley
valabi/o wallaby
valent/o *chem* valency
valerian/o *bot* valerian
Valhal/o Valhalla
valid/a valid; **-i** be valid
valiz/o suitcase, grip
valon/o, -a Walloon
valor/i be worth; **-o** value; **-a** valuable
vals/o, -i waltz
valut/o currency; foreign exchange; valuta
valv/o valve
vampir/o vampire
van/a futile, sterile; **-e** in vain
vanad/o *chem* vanadium
vand/o partition
vandal/o vandal
vanel/o lapwing, peewit (bird)
vanes/o vanessa (butterfly genus, *incl* tortoiseshell, peacock)
vang/o cheek; **-ofrapo** slap on the face; affront
vanil/o vanilla
vant/a frivolous; vain, conceited
vapor/o vapour; steam; **-umi** vaporize, atomize
var/o commodity; **-oj** wares, merchandise
varang/o *naut* floor(-timber)
varap/o rock-climbing; rock-face
varb/i recruit; woo (potential supporters), canvass (support)
varf/o landing-stage, wharf
vari/i vary *intr;* **-o** *bot* variety
variaci/o *mus* variation
varianc/o *math* variance; **-a devio** standard deviation
variant/o variant; *math* variable
varicel/o chicken-pox
variete/o music-hall, variety
varik/o *med* varix, varicosity
variol/o smallpox; **-eto** chicken-pox
varm/a warm; hot; **mal-a** cold; **mal-umi** catch cold; **mal-umo** a cold
varp/o, -i warp (weaving)
Varsovi/o Warsaw
vart/i nurse (child *etc*), look after
vasal/o vassal
vask/o, -a Basque
vast/a spacious, wide, vast, huge; *phon* open (vowel)
Vaŝington/o Washington
1 **vat/o** cotton-wool; wadding
2 **vat/o, vatt/o** *elec* watt

Vatikan/o Vatican
vaz/o vessel (any kind of container); vase; **-aro** dishes, crockery
vazelin/o vaseline
ve! alas! woe! oh dear!; *prefix* **ve/spiri** sigh
veft/o weft, woof
veget/i vegetate
vegetal/o, -a (of the) vegetable (kingdom)
vegetar/a, -ano vegetarian
vehikl/o vehicle (*med;* painting); *med* vector, carrier
vejn/o vein
vek/i arouse, wake up *tr;* **-horloĝo** alarm clock
vekt/o yoke (to carry buckets); beam (of balance *etc*)
vektor/o *math* vector
vel/o sail; *anat* velum
velar/o *phon* velar
veld/i weld *tr*
velen/o vellum
velk/i fade, wither, droop
velociped/o velocipede
velur/o velvet
ven/i come; **-igi** send for; **-ontjare** next year; **al-i** arrive; **de-i** come from, be derived from, result from; **inter-i** intervene; **kun-i** meet *intr;* **re-o** return
vend/i sell *tr*
vendred/o Friday
Veneci/o Venice
venen/o, -i poison
vener/a venereal
Venezuel/o Venezuela
venĝ/i avenge; take revenge
venk/i defeat; win (against); **-o** victory
vent/o wind; **-umi, -umilo** fan; winnow(ing-fan)
ventol/i ventilate
ventr/o belly, paunch, tummy
ventrikl/o *anat* ventricle
Venus/o, -a Venus
vepr/o brushwood, scrub
ver/a true; **-e** truly, really; **-o** truth; **-ŝajna** probable, likely
verand/o veranda
veratr/o *bot* false hellebore
verb/o verb
verbask/o *bot* mullein
verben/o *bot* verbena, vervain
verd/a, -o green
verdigr/o verdigris
verdikt/o verdict
verg/o rod; twig, switch; wand; **-i** birch
verk/i compose, write (essay, report, verse, play *etc*); **-aro** (collected) works
verm/o worm
vermiĉel/o vermicelli
vermifug/o vermifuge
vermiljon/o vermilion
vermut/o vermouth
vernier/o vernier
vernis/o, -i varnish
veronal/o veronal (barbiturate)
veronik/o *bot* speedwell
vers/o (line of) verse
versi/o version
verst/o *obs* verst (*approx* $\frac{2}{3}$ mile)
verŝ/i pour *tr* (liquids); shed, scatter
vert/o crown of the head
vertag/o basset hound
vertebr/o vertebra
vertic/o vertex, apex (of angle, curve)
verticil/o whorl
vertiĝ/o vertigo, dizziness; **-i** feel dizzy
vertikal/a vertical; **-ilo** plummet
veruk/o wart
verv/o animation, zest, verve
vesp/o wasp
vesper/o evening
vespert/o bat (animal)
vespr/o vespers, evensong
vest/i clothe, dress *tr;* **-o** garment
vestal/o vestal virgin
Vestfali/o Westphalia

vestibl/o vestibule, (entrance-)hall, lobby
veŝt/o waistcoat, *US* vest
vet/i, -o bet, wager; **-e** emulously, competitively; **-kurado** race; **-peristo** bookmaker
veter/o weather
veteran/o veteran; ex-serviceman
veterinar/o veterinary surgeon, vet
veto/o, -i veto
vetur/i go, travel (by some sort of vehicle); (of a vehicle) go, run, move *intr;* **-igi** drive; convey; **-ilo** vehicle
vezik/o bladder; bubble; **-eto** blister, vesicle
vezir/o vizier
vi *pronoun* you; **-a** your, yours
viadukt/o viaduct
viand/o meat
viatik/o viaticum, last sacrament
vibr/i vibrate *intr*
vibrafon/o *mus* vibraphone, vibes
vibrion/o vibrio (bacterium)
viburn/o *bot* viburnum
vic/o row, line; **via -o** your turn; **unua-e** in the first place; primarily; *prefix* (*i*) vice-: **-prezidanto**; (*ii*) spare, reserve: **-parto** spare part; (*iii*) step-: **-frato** step-brother
vici/o *bot* vetch
vid/i see; **-o** sight; **-aĵo** view; **-indaĵo** place of interest
vidv/o widower; **-ino** widow
Vien/o Vienna
vigl/a alert, wide-awake; brisk
vigvam/o wigwam
vikari/o curate (of parish); vicar, deputy
viking/o viking
viktim/o victim
vikun/o *zool* vicuña
vil/o (untidy) tuft of hair; *anat* villus; **-a** hairy, shaggy
vila/o villa; (country, seaside) cottage
vilaĝ/o village
Vilhelm/o William
vimen/o osier; **-korbo** wicker basket; **-vergo** withy
vin/o wine; **-bero** grape
vinagr/o vinegar
vinĉ/o winch
vind/i swathe; bandage, bind up; **-otuko** nappy
vindas/o windlass
vinil/o *chem* vinyl; **poli-klorido** polyvinyl chloride, PVC
vinjet/o vignette; text illustration
vink/o *bot* periwinkle
vinkt/o, -i rivet (china); (paper-) clip
vintr/o winter
viol/o, -(kolor)a violet
violon/o violin; **-i** play the violin
violonĉel/o *mus* cello
vip/o, -i whip
viper/o, vipur/o adder, viper
vir/o man (as opposed to woman or child); **-eco** virility; **-ino** woman; *prefix* male (animal): **-ŝafo** ram
virg/a virgin(al); **-ulino** virgin
virt/o virtue; **mal-o** vice
virtual/a *philos, opt* virtual
virtuoz/o virtuoso
virus/o virus
viscer/o internal organ; **-oj** viscera
visk/o mistletoe
viski/o whisky
1 **viskoz/a** viscous
2 **viskoz/o** viscose
vist/o whist
viŝ/i wipe; **-tuko** duster; dish-cloth
vit/o vine
vital/a *philos* vital
vitamin/o vitamin
vitr/o glass (material); (eye-, watch-)glass
vitral/o stained glass window
vitrin/o show-case
vitriol/o vitriol
viv/i live; **-o** life; **-u . . . !** long live . . . !; **-uo, -ui** cheer, hurrah; **tra-i, tra-aĵo** experience

vivisekci/o vivisection
viz/o visa
vizaĝ/o face
vizi/o a vision; **-a** visionary
vizier/o visor; peak (of cap)
vizit/i, -o visit; **-adi** attend (regularly)
vizon/o (American) mink
vjetnam/o, -a Vietnamese; **V-o** Vietnam (*Note: usage divided*)
vjol/o *mus* viol
voĉ/o voice; vote; **-e** orally; **-doni** vote
vodevil/o vaudeville, light comedy
vodk/o vodka
voj/o way, road, route; **-montrilo** signpost
vojaĝ/i travel; **-o** journey
vojevod/o voivode (commander)
vok/i call; summon; **al-i** appeal to, invoke; **el-i** evoke; bring about
vokal/o vowel
vokativ/o vocative (case)
vokt/o taskmaster
vol/i want (to), be willing, choose (to); **-o** will; **laŭ-e** optionally, to taste
volan/o shuttlecock
Volapuk/o Volapük
volatil/a *chem* volatile
volb/o vault (arched roof)
volfram/o *chem* wolfram, tungsten
volitiv/o *gram* volitive (mood)
volont/e willingly, gladiy; **-ulo** volunteer
volovan/o vol-au-vent
1 **volt/o** *elec* volt
2 **Volt/o** Volta (country, river)
Volta/o Volta (man); **-eca** voltaic
Volter/o Voltaire
volum/o volume, tome
volumen/o *geom* volume
volupt/o sensual pleasure; **-a** voluptuous
volut/o volute, spiral (carving)
volv/i wind (into ball, onto spool), wrap round; **dis-iĝi** develop *intr*, open out
vom/i vomit, throw up
vombat/o wombat
vomer/o *anat* vomer (bone)
vor/i *lit* devour; *bio* feed on
vort/o word; **-aro** dictionary; **-ludo** pun
vortic/o vortex (whirlwind; whirlpool)
vost/o tail
vot/o, -i vow
vring/i *lit* wring
vual/o, -i veil
vulgar/a common, everyday; vernacular; **-aĉa** vulgar; **-igo** popularization
Vulgat/o Vulgate
vulkan/o volcano
vulkaniz/i vulcanize
vulp/o fox
vultur/o vulture
vulv/o *anat* vulva
vund/i wound, injure

Z

Zambi/o Zambia
ze/o dory (fish)
zebr/o zebra
zebu/o zebu
zefir/o zephyr, breeze
Zeĥarja Zachariah
Zeland/o Zealand; **Nov-o** New Zealand
zelot/o zealot
zen/o Zen; **-ismo** Zen Buddhism
zenit/o zenith
zepelin/o zeppelin
Zetland/o Shetland
zeŭgm/o zeugma
Zeŭs/o Zeus
zibel/o sable (animal)

zigom/o *anat* zygoma, cheek-bone
zigot/o *bio* zygote
zigzag/o, -a, -i zigzag
zim(az)/o zymase; **-iga** zymotic
zimbalon/o dulcimer
zingibr/o ginger
zini/o *bot* zinnia
zink/o zinc
zip/o zip (fastener)
zirkon/o zircon
zirkoni/o *chem* zirconium
zizel/o suslik, Siberian marmot
zizif/o jujube (fruit)
zlot/o zloty (coin)
zoark/o blenny (fish)
zodiak/o zodiac
zom/i *aero* zoom
zon/o belt; zone
zoofit/o zoophyte
zoolog/o zoologist
zoologi/o zoology
zoospor/o *bio* zoospore
zorg/i care for; be concerned over; be anxious about; **-o** care; **-anto** guardian; **-ato** ward; **pri-i** take care of
zoster/o sea-wrack
zostr/o *med* shingles
zuav/o *mil* zouave
zum/i hum; buzz

ENGLISH—ESPERANTO DICTIONARY

A

a, an *no equivalent:* **a man** homo
Aaron Aarono
aback: taken a. konsternita
abacus abako
abaft malantaŭ, -e, -en
abandon forlasi; senĝeno; **-ed** diboĉa, senbrida
abase malnobligi, humiligi
abash hontigi; konfuzi
abate malfort-igi, -iĝi; rabati
abattoir buĉejo
abbess abatino
abbey abatejo
abbot abato
abbreviate mallongigi
abbreviation mallongigo
abdicate abdiki
abdomen abdomeno
abduct forrabi
Abel Habelo
aberrant aberacia
aberration deflankiĝo; (*sci*) aberacio
abet instigi; subteni
abeyance: in a. dormanta, nedecidita
abhor abomeni
abhorrent naŭza, abomena
abide resti; toleri; **a. by** resti fidela al
ability kapablo; lerto
abject mizera; ekstrema
abjure malkonfesi, forĵuri
ablative ablativo
ablaze flamanta
able kapabla; lerta; **be a. to** povi; scii; **a.-bodied** fortika; servokapabla; **a. seaman** (korpkapabla) maristo
ablution(s) lav-ado, -ejo
abnegation abnegacio
abnormal eksternorma
aboard surŝip-e, -en
abode loĝejo
abolish forigi, abolicii
abolition forigo, abolicio
abominable abomeninda
abominate abomeni
aboriginal indiĝena
aborigine indiĝeno, praloĝanto (de Aŭstralio)
abortion aborto
abortive aborta, vana
abound abundi
about (*prepn*) ĉirkaŭ; pri; (*adverb*) proksimume, ĉirkaŭ; preskaŭ; apude; **a. to** -onta
above (*prepn*) super; (*adverb*) supre; **a. all** antaŭ ĉio
abrasion skrapvundo; frotado
abrasive froteluza, *ŝlifa
abreast flankon ĉe flanko; fronte
abridge mallongigi, epitomigi
abroad eksterland-e, -en
abrogate nuligi
abrupt abrupta; apika
abscess absceso
abscissa absciso
abscond forkuri, fuĝi
absence foresto; manko
absent forestanta, mankanta; **a.-minded** malatenta, distriĝema
absentee forestanto, mankanto
absinthe absinto
absolute absolut-a, -o
absolution absolvo
absolve absolvi
absorb sorbi; (*engross*) absorbi
absorption sorbo; absorbo

abstain (*voting*) sin deteni; (*e.g. from drink*) abstini
abstemious abstin(em)a
abstention sindeteno
abstinence abstino
abstract abstrakt-a, -i, -o; resumo
abstruse profunda, malfacile komprenebla
absurd absurda
abundance abundo
abundant abunda
abuse insult-i, -ado; misuz-i, trouz-i, -o
abusive insulta
abut on esti apogita per; tuŝi
abutment abutmento
abysmal abisma
abyss abismo
Abyssinia, -n Abisen-ujo, -a, -o
acacia akacio; robinio
academic akademia
academy akademio
acanthus akanto
accede konsenti
accelerate akcel-i *tr*, -iĝi
accent akcent-o, -i; (*on letter*) supersigno
accentuate akcenti
accept akcepti; konsenti
access alir-o, -ejo
accessible alirebla
accession aldonaĵo; surtroniĝo
accessory akcesor-a, -aĵo; komplico
accidence fleksio
accident (*mishap*) akcidento; (*chance*) hazardo
acclaim aklami
acclamation aklamo
acclimatize alklimat-igi, kutim-igi, -iĝi
accolade honorado; vinkulo
accommodate loĝigi, gastigi; (*adapt*) akomod-i *tr*, -iĝi
accommodation loĝ-igo, -ejo; akomodiĝo
accompaniment akompan(ad)o
accompany akompani
accomplice komplico
accomplish efektivigi, plenumi
accomplishments artoj
accord akord-o, -i; doni; **of one's own a.** propravole; **-ing as** tiel, kiel; **-ing to** laŭ; **-ingly** konforme; do
accordance: in a. with konforme al
accordion akordiono
accost alparoli
account konto; kalkulo; raporto; klarigi
accountable respondeca
accountancy kontado, kontoscienco
accountant kontisto
accoutrement(s) ekipaĵo
accredit akrediti
accretion alkresk-ado, -aĵo
accrue aldoniĝi
accumulate amas-igi, akumul-i *tr*, -iĝi
accumulator akumulatoro
accurate ekzakta, preciza
accursed malbenita
accusative akuzativo
accuse akuzi
accustom kutimigi; **be -ed** kutimi
ace aso
acerbity maldolĉo, *acerbo
acetate acetato
acetic aceta
acetone acetono
acetylene acetileno
ache dolor-o, -i
achieve atingi, efektivigi
Achilles Akilo
achromatic akromata
acid acid-o, -a
acknowledge konfesi, agnoski; avizi ricevon (de)
acme pinto, kulmino
acne akno
acolyte akolito
aconite akonito
acorn glano
acotyledon senkotiledona planto

acoustic(al) akustika
acoustics akustiko
acquaint informi; **be -ed with** koni
acquaintance konato; kono
acquiesce konsenti
acquire akiri
acquisition akiro
acquisitive akirema
acquit malkondamni, absolvi
acre †akreo (= 0,4 hektaro)
acreage areo, surfacamplekso
acrid akra
acrimonious akra, amara
acrobat akrobato
acrobatics akrobataĵo(j)
acronym akronimo
acropolis akropolo
across (*on the other side of*) trans *with nom;* (*to the other side of*) trans *with accus;* trans-e, -en
acrostic akrostiko
acrylic akrila
act ag-o, -i; funkcii; aktori; akto; konduti
actinic aktina
actinium aktinio
actinometer aktinometro
action ago, faro; efiko; funkciado; batalo; proceso
actionable procesebla
activate aktivigi
active aktiv-a, -o; agema
activity agado, aktiveco
actor aktoro; aganto
actress aktorino
actual efektiva
actually efektive; eĉ
actuary (asekura) statistikisto, *aktuaro
actuate funkciigi; peli
acuity akreco
acumen sagaco
acupuncture akupunkturo
acute akuta; sagaca; (*accent*) dekstrakorna
adage proverbo, sentenco
adagio adaĝ-o, -e
Adam Adamo
adamant ŝton-a, -kora
adamantine diamanteca
adapt adapt-i *tr*, -iĝi; akomod-i *tr*, -iĝi; taŭgigi
adaptable akomodiĝema
adaptation adapt-o, -aĵo
add aldoni; **a. up** adicii *tr;* sumi *intr*
addendum aldonaĵo
adder vipuro
addict (*e.g.* morfino-)-maniulo, -sklavo
addiction (-)manio, (-)sklaveco
addition aldono; adicio; **in a.** krome; **in a. to** krom
additional aldona, plua
addle putrigi; **-d** putra
address adres-o, -i; alparoli; parolado
addressee adresato
adduce citi
adenoids adenoidoj
adenoma adenomo
adept lert-a, -ulo
adequate sufiĉa; adekvata
adhere algluiĝi, *adheri
adhesion algluiĝo, *adhero
ad hoc porokaza
adiabatic adiabata
adieu adiaŭ
ad infinitum senlime
adipose gras(ec)a
adjacent apuda
adjective adjektivo
adjoin kuntuŝiĝi, najbari, apudesti
adjourn prokrasti, fermi (kunsidon); translokiĝi
adjudge juĝi; deklari
adjudicate decidi, juĝi
adjunct akcesor-aĵo, -ulo; adjekto
adjure ĵurpeti
adjust (al)ĝustigi; akomod-i *tr*, -iĝi
adjutant adjutanto; marabuo
ad lib laŭplaĉe; improvizi
administer administri; doni
administration administr-ado, -ejo, administracio

administrator administranto
admirable admirinda
admiral admiralo
admiralty admiralitato
admire admiri
admissible allasebla, akceptebla
admission konfeso; enlaso; eniro
admit konfesi; enlasi
admittance enlaso; (*elec*) admitanco
admixture almikso
admonish admoni
ado ekscitiĝo, bruo
adobe adob-o, -a
adolescence junaĝo, *adolesko
adolescent adolesk-a, -anto
adopt adopti
adorable adorinda
adore adori
adorn ornami
adrenal ĉerena
adrenalin adrenalino
Adrian Adriano
Adriatic Adriatiko
adrift drivanta
adroit lerta
adulate flategi
adult plenaĝ-a, *adolt-a, -ulo
adulterate falsi, fuŝmiksi
adulterer adultulo
adultery adulto
adumbrate (antaŭ)skizi
advance antaŭen-iri, -iro, -movi *tr*, -puŝi *tr*; plialt-igi, -iĝi; antaŭpag-i, -o; prunt(edon)i; antaŭa, anticipa; propono, logincito; **-d** progres-ema, -inta; altgrada
advantage avantaĝo; supereco; **take a. of** ekspluati
advantageous avantaĝa, profita
advent alveno; Advento
adventitious hazarda
adventure aventuro; travivaĵo
adventurer aventuristo
adverb adverbo
adversary kontraŭulo
adverse malfavora; kontraŭa
adversity malfeliĉo; mizero
advertise reklami; anonci
advertising reklamado
advertisement reklamo; anonco
advice konsilo; (*notice*) avizo
advisable konsilinda
advise konsili; avizi
advisedly intence
advisory konsila, konsulta
advocacy rekomendo
advocate rekomend-i, -anto; advokato
adze adzo
Aegean Egea (Maro)
aegis egido
Aeneas Eneo
Aeneid Eneado
Aeolian eola
aeon eono
aerate aerumi, ventoli; gasigi
aerial aera; anteno
aerobatics aerobatiko
aerodrome aerodromo
aerodynamic, -s aerodinamik-a, -o
aerodyne aerodino
aerofoil planeo
aerolite, aerolith aerolito
aeronaut aeronaŭto
aeronautic(al), -s aeronaŭtik-a, -o
aeroplane aeroplano, flugmaŝino
aerosol aerosolo
aerostatics aerostatiko
Aeschylus Eskilo
Aesculapius Eskulapo
Aesop Ezopo
aesthetic(al), -s estetik-a, -o
aetiology etiologio
afar malproksime
affable afabla
affair afero; amafero
affect *1* tuŝi, rilati; emocii; afekci-o, -i
affect *2* afekti; **-ed** afekta
affectation afekt-o, -aĵo
affection korinklino, amo, kareco; afekcio
affectionate am-a, -ema
affidavit ĵurdeklaro

affiliate fili-igi, -iĝi
affinity afineco
affirm aserti; solene ĵuri
affirmative jes-a, -o
affix afikso; alfiksi
afflict aflikti
affliction aflikto
affluence riĉeco, abundo
affluent riĉa, abunda
afford povi; havi la rimedojn por, toleri la elspezon por; doni
afforest arbarigi, forstumi
affray interbatiĝo
affricate afrikato
affront insult-i, vangofrap-i, -o
Afghan, -istan Afgan-o, -a, -lando
afield: far(ther) a. (pli) malproksim-e, -en
aflame arda, fajra
afloat surakve, flosanta
afoot preparata
afore- antaŭ-
aforethought: with malice a. malbonintence
afraid: be a. timi
afresh denove
Africa, -n Afrik-o, -a, -ano
Afrikaans afrikans-o, -a
aft malantaŭen
after (*prepn*) post; laŭ; pri; (*conj*) post kiam; (*adverb*) poste; (*adj*) posta; **after-** post-; **a. all** fine; malgraŭ ĉio
aftermath postrikolto; sekvo
afternoon posttagmez-o, -a
afterward(s) poste
aga agao
again denove, re(foj)e; ankoraŭfoje; re-; plue
against kontraŭ
agape *1* gapanta
agape *2* agapo
agar(-agar) agaragaro
agate agato
agave agavo
age aĝo; epoko; plenaĝo; maljunaĝo, -iĝi; malfreŝiĝi; **for ages** dum tre longa tempo; **aged** havanta . . . jarojn; maljuna
agency agent-ejo, -eco; oficejo, instanco; faktorio; efik-ado, -anto
agenda tagordo
agene nitrogena triklorido
agent agento; per-isto, -anto; aganto; rajtigito
agglomerate aglomer-i *tr*, -iĝi
agglutinative aglutina
agglutinate aglutin-i *tr*, -iĝi
aggrandize (pli)grand-igi, -iĝi
aggravate pli(grand)igi, plimalbonigi; agaci
aggregate sum-o, -a; agregat-o, -igi
aggression atakemo, agreso
aggressor agresanto
aggrieve ofendi
aghast konsternita
agile movlerta, vigla
agio aĝio
agitate agiti; eksciti, maltrankviligi
aglow arda
agnostic agnostik-a, -ulo
ago: two years ago antaŭ du jaroj
agog streĉe atenda
agonize tortur-i *tr*, -iĝi
agony angoro, dolorego
agoraphobia agorafobio
agrarian agrara
agree (inter)konsenti; (*harmonize; gram*) akordiĝi
agreeable agrabla; **be a.** konsenti
agreement (inter)konsento; kontrakto; (*gram*) akordo
agriculture agrikulturo
agrimony agrimonio
agronomist agronomo
agronomy agronomio
aground: run a. grundi
ague febro
ah!, aha! ha!
ahead antaŭe(n)
ahoy! hoj!

aid help-o, -i
aide adjutanto; helpanto
ail: what ails you? de kio vi suferas? **ailing** suferanta, malsana
ailanthus, ailanto ailanto
aileron alerono
ailment malsano
aim cel-i, -o; (*gun*) -umi
aimless sencela
air aero; mieno; (*tune*) ario; aerumi; **air chief marshal** (aerarmea) generalo; **air-condition, -ing** klimatiz-i, -ado; **air-crew** aviadistaro; **air force** aerarmeo, flugarmeo; **air-field** flugkampo; **air-hostess** stevardino; **air-line** aerlinio; **air-liner** (pasaĝera) aviadilo; **air-lock** aerkluzo; **air-mail** aerpoŝt-e, -a, -o; **air marshal** (aerarmea) subgeneralo; **air-pocket** aer-kavo, -truo; **air-raid** aeratako; **air-screw** helico; **air-ship** aerŝipo, zepelino; **air-sickness** aermalsano; **air-strip** surteriĝa tereno; **air-tight** hermetika; **air vice marshal** (aerarmea) divizia generalo
aircraft aviadilo(j)
aircraftman ordinara flugsoldato
airman flugsoldato; aviadisto
airplane aeroplano, flugmaŝino
airport flughaveno
airworthy flugtaŭga
airy malserioza, *leĝera; aera
aisle flanknavo; trairejo, koridoro
ajar nefermita
akimbo kun la manoj sur la koksoj, kun ansformaj brakoj
akin parenca
alabaster alabastro
alack! ho ve!
alacrity volonteco, avido
alarm alarm-o, -i; tim-o, -igi; vekhorloĝo
alas! ho ve!
alb albo
Albania, -n Alban-ujo, -a, -o
albatross albatroso
albeit kvankam
Albert Alberto; brelokĉeno
albino albin-o, -a
album albumo
albumen (*in egg or seed*) albumeno
albumin (*kind of protein*) albumino
alchemist alkemiisto
alchemy alkemio
alcohol alkohol-o, -aĵo
alcoholic alkohol-a, -ulo
alcoholism alkoholismo
alcove alkovo
aldehyde aldehido
alder alno
alderman †ĉefkonsilanto, *aldermano
Alderney Aldernejo
ale (speco de) biero, elo
Alec Aleksandro, Alekĉjo
alembic distililo
alert vigla; alarm-o, -preta
Alexander Aleksandro
alexandrine aleksandro
alfalfa luzerno
alfresco subĉiel-a, -e
alga(e) algo(j)
algebra algebro
Algeria, -n Alĝeri-o, -a, -ano
Algiers Alĝero
alias alinom-e, -o
alibi alibio
alien alinaci-a, -ano; fremda
alienate aliproprigi; deturni
alienist specialisto pri mensmalsanoj
alight *1* elvagoniĝi, elaŭtobusiĝi
alight *2* flamanta
align (rekt)liniigı, vicigi
alike simil-a, -e; egale
alimentary nutra
alimony alimento
aliquot part ono
alive viv(ant)a; **be a.** vivi; **be a. to** konscii
alkali alkalo
alkaline alkala
alkaloid alkaloido

all ĉio; ĉiuj; la tut-a, -o; ĉia; ĉiom; tute; **at all** (en)tute; **all-in** inkluziva; elĉerpita; pankraca; **all-round** kompleta, ĉiuflanka; **all the better** des pli bone
Allah Alaho
allay kvietigi, mildigi
allege aserti, akuzi; **-d** kvazaŭa, supoza
allegiance aparteno; lojaleco
allegory alegorio
allegro alegr-o, -e
alleluia! haleluja!
allergic alergia; **I'm a. to fish** fiŝaĵo ne konvenas al mi
allergy alergio
alleviate mildigi, moderigi
alley strateto
alliance alianco; boparenceco
alligator aligatoro
alliteration aliteracio
allocate asigni
allocation (asignita) porcio
allopathy alopatio
allophone alofono
allot difini, asigni
allotment asigno; disdivido; (*ground*) parcelo
allow permesi; allasi; koncesii; doni; rabati
allowance rento; (mon)asignaĵo, *alimento; **make -s for** kalkuli kun, preni en konsideron; indulgi
alloy aloj-o, -i
allspice pimento
allude aludi
allure (al)logi
allusion aludo
alluvial aluvia
alluvium aluvio
ally alianc-i, -ano
almanac almanako
almighty ĉiopova
almond migdalo
almoner (hospitala) oficistino pri socia bonfarto
almost preskaŭ
alms almozo
aloe aloo
aloft supre(n)
alone sol-a, -e
along laŭ, laŭlonge de; (*onward*) antaŭen; **a. with** kune kun
alongside apud, -e; krom
aloof apart-a, -e
aloud laŭte; **read a.** laŭtlegi, voĉlegi
alp alpo; **the Alps** la Alpoj
alpaca alpako
alpenstock montbastono
alpha alfa; **a.-rays** alfaradioj
alphabet alfabeto, aboco
alpine alpa
already jam
Alsace Alzaco
Alsatian (*dog*) germana ŝafhundo
also ankaŭ
altar altaro
alter ŝanĝ-i *tr*, modif-i *tr*, ali-igi, -iĝi; kastri
altercation disputo
alternate altern-a, -i *intr*, -igi; **A.C.** alterna kurento
alternative alia, dua, anstataŭa (ebleco *etc*); ebleco; (*option*) alternativo; **-ly** ali(kaz)e
alternator alternatoro
although kvankam
altimeter altometro
altitude alteco; altitudo
alto ald-o, -a
altogether tute
alto-relievo altreliefo
altruism altruismo
altruistic altruisma
alum aluno
alumina alumino
alumin(i)um aluminio
alumnus eks-lernanto, -studento
alveole, alveolus alveolo
always ĉiam
alyssum aliso
amalgam amalgamo
amalgamate amalgam-o, **-i** *tr*, **-iĝi**; kununu-igi, iĝi

amanuensis sekretario
amarant(h) amaranto
amass amas-igi, -iĝi
amateur amator-o, -a
amateurish amator(ec)a, diletanta
amatory am-a, -ema
amaze mir-igi, -konsterni
amazement mir-(eg)o, -konsterno
Amazon (*myth, geog*) Amazon-o, -a Rivero
ambassador ambasadoro
amber sukcen-o, -koloro, -(kolor)a, flava
ambergris ambro
ambidext(e)rous ambaŭdekstra
ambient ĉirkaŭa; media
ambiguity dubasenceco; dusenceco
ambiguous dubasenca; dusenca, dusignifa
ambition ambicio
ambivalent dusenca, ama-malama
amble ambl-o -i; trankvile paŝi
ambrosia ambrozio
ambulance ambulanco
ambuscade, ambush embusk-o, -i
ameliorate plibon-igi, -iĝi
amen amen, -o
amenable obeema, influebla
amend, -ment (*resolution etc*) amend-i, -o; korekt-i, -o
amends kompenso
amenity agrablaĵo
America, -n Amerik-o, (= *US*) Uson-o, -a, -ano
americium americio
amethyst ametisto
amiable afabla
amicable amika; senprocesa
amid(st) inter, meze de
amide amido
amidships mezŝipe
amino-acid aminacido
amiss mis-a, -e
amity amikeco
ammeter ampermetro
ammonia amoniako
ammoniac: sal a. salamoniako
ammonium amonio
ammunition municio
amnesia amnezio
amnesty amnesti-o, -i
amniotic amnia
amoeba amebo
amok → AMUCK
among(st) inter
amoral senmorala, moralofremda
amorous amema
amorphous amorfa; malpreciza
amortize amortizi
amount sumo; kvanto; sumiĝi
amour-propre memestimo; ofendiĝemo
amp, ampere ampero
amperage amperaro
amphetamine benzedrin(aĵ)o
amphibian, amphibious amfibi-o, -a
amphibrach amfibrako
amphitheatre amfiteatro
amphora amforo
ample abunda, riĉa, ampleksa
amplifier amplifikatoro, amplifilo
amplify plivastigi; (*elec*) amplifiki
amplitude amplitudo
ampoule, ampulla ampolo
amputate amputi
amuck: run a. freneziĝi, furioziĝi
amulet amuleto
amuse amuzi
amusement amuz-iĝo, -aĵo
an → A
anachronism anakronismo
anacoluthon anakoluto
anaconda anakondo
anaemia anemio
anaemic anemia
anaerobic neaerobia
anaesthesia anestezo
anaesthetic anestez-a, -ilo
anaesthetist anestezisto
anaesthetize anestezi
anagram anagramo
anal anusa
analgesic analgezi-a, -ilo

analogous analoga
analogue analog-o, -aĵo
analogy analogeco; analogio
analyse analizi
analysis analizo
analytic(al) analiza; (*calculus etc*) analitika
analytics analitiko
anapaest anapesto
anarchic(al) anarkia
anarchism anarkiismo
anarchist anarkiisto; anarkiisma
anarchy anarkio
anastigmatic anastigmata
anathema anatemo
anathematize anatemi
anatomical anatomia
anatomist anatomiisto
anatomy anatomio
ancestor prapatro, (*distant*) praulo
ancestral hereda, familia
ancestry familio, deveno; prapatroj
anchor ankr-o, -i
anchorage ankrejo
anchorite dezertulo, ermito
anchovy anĉovo, (*live*) engraŭlo
anchyl . . . → ANKYL . . .
ancient antikva
ancillary helpa, serva
and kaj
andante andant-o, -e
Andes Andoj
andiron fajro-hundo, -stableto
Andrew Andreo
androgen androgeno
androgynous androgina
anecdote anekdoto
anemi . . . → ANAEMI . . .
anemometer anemometro
anemone anemono
aneroid barometer aneroido
anesth . . . → ANAESTH . . .
aneurism, aneurysm aneŭrismo
anew denove
anfractuosity anfrakto
angel anĝelo; **a.-fish** anĝelfiŝo, *skvateno
angelic anĝela
angelica angeliko
angelus anĝeluso
anger koler-o, -igi
angina angino; **a. pectoris** brustangoro
angiosperm angiospermo
angle *1* angulo; tendence aranĝi, prezenti laŭ (iu) vidpunkto; **a.-iron** angulfero
angle *2* (hok)fiŝi
angler fiŝisto
Anglican anglikan-o, -a
anglicism anglismo
anglicize angligi
Anglo- anglo-; **A.-Saxon** anglosaks-o, -a
angry kolera
angstrom anstromo
anguish angoro, turmentiĝo
angular angula; malgrasa
anhydride anhidrido
anhydrous anhidra
anil indig-o, -planto
aniline anilin-o, -a
animal best-o, (*sci, opposed to vegetable*) animal-o, -a
animate inspiri, vigligi; anima, viv(ant)a; **-d** verva
animation vervo, vigleco
animism animismo
animosity, animus koler(em)o, malamikeco
anion anjono
anise(tte), aniseed aniz-o, -likvoro
ankle maleolo; **a.-bone** astragalo
anklet pied-ringo, -braceleto; gamaŝo
ankylose ankiloz-i *tr*, -iĝi
ankylosis ankilozo
Ann(e), Anna Anna
annalist analisto
annals kroniko, *analoj
anneal malhardi
annelid anelido
annex(e) aneks-i, -o; aldon-i, -o
annexation aneks-o, -ado
annihilate neniigi; ekstermi
anniversary datreveno

annotate prinoti, komenti
announce anonci, sciigi
announcement anonco
announcer anoncisto
annoy ĝeni; ĉagreni
annoyance ĝeno, malagrablaĵo; ĉagreniĝo
annual (ĉiu)jara; jardaŭra (planto); jarlibro
annuity (jar)rento
annul nuliĝi
annular ring(oform)a
Annunciation Anunciacio
anode anodo
anodize anodizi
anodyne kvietig-a, analgezi-a, -ilo
anoint ŝmiri; sanktolei
anomalous anomalia
anomaly anomalio
anon poste, baldaŭ
anonymity anonimeco
anonymous anonima
anopheles anofelo
anorak anorako
another ankoraŭ unu; alia (persono . . .); **a. ten years** ankoraŭ dek jaroj; **one a.** unu la alian
answer respond-i, -o; solvo; (*requirements*) plenumi
answerable (*responsible*) respondeca
ant formiko; **a.-bear** mirmekofago; **a.-eater** (*spiny*) ekidno; (*scaly*) maniso; (*great*) mirmekofago; **a.-hill** formikejo
antacid kontraŭacida
antagonism antagonismo
antagonist antagonisto
